INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

2004-01

Januaro 2004

ISSN 1612-7927

Ĉifoje kun kvarpaĝa aldono de la statuto de INA

*ina-asocio@web.de*

www.esp-ina.com

# INA-laboro dum Internacia Festivalo en Kiel (Germanio)



Dum la fama Internacia Festivalo (27a de decembro ĝis 3a de januaro 2004), kiu havis sian dudekan jubileon, INA estis reprezentita per la du vicprezidantoj Kees Ruig kaj Harald Schicke. Schicke prezentis du prelegojn. Unu pri korea ginsengo (foto supre) kune kun sia edzino Song Jeong-ok, alia pri la diferenco inter naturkuracado kaj okcidenta universitata medicino.

Pro la ĉeesto de la duona estraro de INA kaj pluraj membroj, INA havis kvazaŭ permanentan estrarkunsidon.

# Kunlaboro inter AIS kaj INA

Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino kaj INA decidis pri kunlaboro. INA fariĝis subtenanto-partnero por la projekto de Libera Europia Universitato Kelemantia en Komarno, Slovakio.



La emblemo de Komarno

La prezidanto de INA, D-ro Puramo Chong, kaj vicprezidanto Harald Schicke fariĝis membroj de AIS.

Schicke ellaboris planon por la establigo de Instituto pri Alternativa Medicino en la kadro de la Dialogo de Kulturoj.

Tie oni instruos kaj esploros pri popolaj kaj naturkuracaj metodoj de multaj landoj. Fakte ĉie ajn ekzistas specifa kuracado, kiu apartenas al la kulturo de la respektiva lando.

Laŭ la statuto de INA ni deziras informi pri la diversaj popolaj kaj naturkuracaj metodoj. Tial la projekto de la Libera Universitato perfekte kongruas kun la statuto de INA.

La urbo Komarno situas ambaŭflanke de la rivero Danubo. Depost la unua mondmilito ĝi estas divita al du partoj, unu slovaka, la alia hungara.

La universitato estos fondita je la centra Eŭropa Placo en la koro de la pitoreska slovaka parto de la urbo.

AIS la interreto: *www.ais-sanmarino.org*

# Faka Agado

Harald Schicke studis korean akupunkturon Saam dum kvar semajnoj en la kliniko de D-ro Puramo Chong en Koreio. Schicke prelegis pri la situacio de naturkuracado en Eŭropo. Aperis unu granda artikolo en taga gazeto, du en fakaj revuoj kaj intervjuo en la germana fako de Radio Koreio Interacia. Ĉiuj menciis Esperanton. Schicke nun disvastigos Saam en la germanlingva parto de Eŭropo.



*Komuna manĝo kun ĵurnalisto en fiŝrestoracio apud la kliniko de D-ro Chong*



*Germanlingva intervjuo de Radio Koreio Internacia en la kliniko de D-ro Chong*


# Medicinistoj deturnas sin de la homeopatio

Ĉiam malpli da medicinistoj montras intereson pri homeopatio. La nombro da membroj de la medicinista asocio pri homeopatio (VHAN) malkreskis de 443 fine de 1993 ĝis 262 nun. Kvankam ĉiam malpli da homeopatiaj medicinistoj praktikas, la nombro de pacientoj kontraŭe kreskas.

Laŭ la nederlanda revuo "Gezondheidsnieuws" (Sanecnovaĵoj) kiu sin okupas prinaturkuracaj metodoj, la nombro de medicinistoj kiuj sekvis aldonan studadon pri homeopatio, malkreskis dum la lastaj dek jaroj je 90%! En septembro 2002 13 medicinistoj komencis sian homeopatian studadon, en 1992 ili estis pli ol 100! Samtempe pli kaj pli da nederlandanoj vizitas naturkuracistojn, homeopatojn, akupunkturistojn aŭ ortomolekulajn medicinistojn. Ekzistas tie atendolistoj. La kaŭzo estas duopa.

La sepjara universitata medicina studado ne enhavas fakojn kiel homeopation kaj akupunkturon. La tiea etoso estas kontraŭnaturkuraca. Tia kulturo tre malfavora por interesiĝantaj studentoj. "Naturkuracado estas kvazaŭ el alia mondo" konkludas Stan van Eck de Gezonheidsnieuws.

Eksterlande la situacio estas tute diferenca. Du trionoj de la usonaj universitatoj instruas i. a. akupunkturon, homeopation kaj plantoterapion. Ili apartenas al la normala instruprogramo de ĉiu medicina studento. Eĉ se li estas kontraŭ tiaj terapioj, li devas almenaŭ scii pri kio li parolas.



*D-ro Samuel Hahnemann, la iniciatinto de la homeopatio (1790), 1755-1843*

Estas kontraŭscience diri "Homeopatio ne efikas", se vi ne konas la teorian funde de ĝi.

Konsekvence ĉiam malpli da medicinistoj en Nederlando kuraĝas montri sian intereson pri naturkuracado publike. Ili timas stimiĝon de kolegoj.

*Tradukita de Kees RUIG el la gazeto Het Parool.*

Rimarko de la tradukinto: jen pruvo pri la ekzistutilo de asocioj kiel INA.

# Abeloj kaj abelaj produktoj

**(la dua parto) de *Rosa Ebel*, Krefeld, Germanio**

## Mielo, ĝiaj konsistigaj substancoj kaj iliaj efiko



*Jen la nutraĵo por bongusta mielo (botanika ĝardeno de Krefeld)*

Unutipa manĝaĵo de la homo, kio ne estas raraĵo en la nuntempo, kaŭzas manko-funkciojn en la organismo. Nutraĵ-sciencistoj konsilas variajn manĝaĵojn, kiuj liveras al la korpo en sufiĉa kvanto diversajn mineralaĵojn, vitaminojn, proteinon kaj karbonajn hidroksidojn. En la mielo oni ĝis nun konstatis jam pli ol 180 naturajn substancojn, dank' al kiuj ĝi estas vera „vigligaĵo“ inter la ceteraj manĝaĵoj. Tial indas la rigardo en la internon de la mielo, por konatiĝi kun ĝia enhavo.

### Sukero

La mielo enhavas inter 35% kaj 40% da fruktoza kaj inter 30% kaj 35% da glukoza sukero. Krom tio en ĝi estas prezentaj pluraj aliaj sukerspecoj kiel, ekzemple,

maltozo, sakarozo kaj similaj. La mieloj de kamparaj floroj enhavas ĝis 80% da sukero, tio faras ilin milde dolĉaj. La arbaraj mieloj gustas pli akre kaj iom pli spice, ĉar ilia sukerenhavo estas nur 60%.

## Akvo

Ankaŭ akvo estas konsistiga parto de la mielo kaj depende de la mielspeco atingas de 15% ĝis 20% de ĝia enhavo. Pli granda kvanto da akvo atestas pri la malbona kvalito de la mielo kaj povas kaŭzi ĝian fermentadon.

## Mineralaĵoj kaj oligoelementoj

Cl, K, Ca, Cu, Mg, Na, P, Si, S, silika acido - estas konsistigaj mineralaĵoj de la mielo. El oligoelementoj en menciinda kvanto ĉeestas Cr, Fe, J, Mn. Manko de tiuj elementoj en la korpo kaŭzas gravajn malakordiĝojn en la funkciado de la organismo, ekzemple, de abunda haro-elfalado, funkcio-reduktiĝo de diversaj organoj ĝis plena senfortiĝo.

## Vitaminoj

Krom mineralaĵoj kaj oligoelementoj la mielo enhavas vitaminojn de grupo B:

- B1 (tiamino)
- B2 (riboflavino) kaj
- B6 (pirodoksino).

Tiuj tri vitaminoj ludas esencan rolon ĉe multaj metabolaj procesoj. La riboflavino aldone subtenas la spiradon de la korpoĉeloj kaj stimulas la kreskadon. Peroksinon la korpo bezonas ĉe la sangoproduktado.

La C-vitamino (askorbina acido) ĉeestas en la mielo nur en tre malgranda kvanto, tial oni preferu kompensi la C-vitaminbezonon per aliaj produktoj, ekz. el verda papriko aŭ citrusaj fruktoj. En etaj kvantoj la mielo enhavas ankaŭ aliajn vitaminajn acidojn: pantotenatan, nikotinatan, folatan. Tiuj vitaminoj ĉiuj estas akvo-solveblaj kaj lum-sentemaj (sensivaj).

Kontraŭe al la aliaj abelaj produktoj la mielo *ne enhavas* oleo-solveblajn vit-



aminojn A, D, E kaj K.

## Enzimoj

Enzimoj (fermentoj) estas substancoj, kiujn la abeloj aldonas al la mielo, kaj kiuj transformas sukerojn de komplikaj formoj je sukeroj de pli simplaj formoj - tiujn la organismo povas facile utiligi. Enzimoj do kaŭzas la multecon de sukerspecoj en la mielo. Ĉe fermenta transformiĝo de la sukeroj aperas ankaŭ antibakteriaj substancoj, kiuj ebligas daŭran konserviĝon de la mielo kaj mildigan efikon ĉe infektiĝo de la bronkoj.

## Inhibinoj

Inhibinoj estas substancoj, kiuj en ligo kun enzimoj efikas simile al antibiotikoj: ili ĝenas la kreskadon de bakterioj kaj de aliaj mikroorganismoj. El la jam konataj inhibinoj estas menciindaj flavonoidoj, kiuj donas al la mielo la flavan koloron. Lastjaraj esploroj pri flavonoidoj permesas esperon, ke ili preventas kanceran malsaniĝon.

## Aminoacidoj

Aminoacidoj de 14 specoj, inter ili ĝis 85% da prolino, zorgas en la organismo pri la reproduktado de proteino kaj de ruĝaj sango-globetoj.

## Acidoj

Multaj organikaj acidoj, ekzemple la formikata, pomata, buterata, sukcenata, laktata, vinagra kaj pluraj aliaj ankaŭ troviĝas en la mielo. Kune kun la poleno ili stimulas apetiton kaj digestadon.

## Poleno

Depende de la nektarkolekta regiono kaj diverseco de floroj, la poleno nombras en la mielo de kelkaj specoj ĝis pluraj centoj. Ĝi ĉeestas nur en flordevenaj mieloj, sed ne en la arbaraj. Same kiel la acidoj ĝi stimulas la digestadon.

## Aromaj substancoj

Ili devenas de eteraj plantaj oleoj, havas ties aromon kaj guston kaj respondecas pri la aroma kaj gusta riĉeco de diversaj mielspecoj.

Tiu estas nur malgranda ekzemplo pri la enhavo kaj efiko de mielaj substancoj. Pri la diverseco de mielspecoj kaj iliaj specialaj kuracaj efikoj legu en la daŭriga parto de mia artikolo.

## Ĉu lingvo-saniga terapio apartenas al naturkuraca aŭ al okcidenta medicino?

Mi estas laŭ la profesio lingvo-saniga pedagogo. Tio estas komparebla al logopedisto, kies profesia okupo en multaj landoj estas konata. Mi okupiĝas pri lingvaj perturbaĵoj de homoj, kiuj suferas aŭ nur pro ĝi aŭ ankaŭ de aliaj korpaj malsanoj, ekz. apopleksio, malsanoj de la gorĝo, nazo, oreloj, dentoj, makzeloj aŭ malsanoj sekvantaj handikapojn. Kelkfoje la korpaj malsanoj malaperas kaj postlasas lingvan (parolan) malsanon.

Kiel escepto la metodo de nur parta resanigo uzas fizikajn rimedojn por influi la lingvajn kapablojn. Ekzemple, se voĉkordo estas paralizita, la funkci-ebleco estas konservata per elektra stimulado. Sed la tipa kaj ĉefa metodo de la influo estas pedagogio-psikologia agado. Memkompreneble tia agado apartenas ankaŭ al natur- aŭ establita kuracado. La diferenco konsistas en la grado de la pedagogio-psikologia agado en mia profesio. Tiu trajto estas trovebla ankaŭ en aliaj kuracohelpaj profesioj: kuracgimnastiko, laborterapio, dietiko, psikologia terapio.

Tial, laŭ mia opinio, mia fako apartenas nek al la unua, nek al la alia medicino, sed estas relative memstara. Malgraŭ tio la aktuala pensmaniero, ekspliki la malsanojn kaj iliajn kaŭzojn, ofte venas de la

establita medicino. Tio ne nepre devas ĉiam resti la sama, ĉu ne?

*Hans Bernd Ashauer-Jerzimbeck*
Lüneburger Weg 3, 40468 Düsseldorf
Germanio, *Jerzim@gmx.info*

# De niaj membroj kaj legantoj

## Urba abelbredado en Nederlando

Karaj samideanoj.
Dankon pro la sendo de la revueto INA. Ĝi estas interesa. Legante la artikolon pri abeloj mi rememoris pri mia somera feriado en Nederlando. Pere de Pasporta Servo mi loĝs ĉe Esperanto-paro en la urbo Voorburg (antaŭurbo de Den Haag. Ili havas abelojn en la eta urba ĝardeno. Kiel donaco mi ricevis 2 ujojn de mielo el la homdensa Holando. Ĉu vi aŭdis pri tiu abelisto? Li nomiĝas Gerard Mezenberg, *gj.mezenberg@xs4all.nl*

Korajn salutojn al vi de

*Wim Posthuma*, Soldatgatan 40
S 723 45 Västerċs (110 km okc de Stokholmo) Svedio
telefono/fakso: + (46 0)21 133 529
E-poŝto: *wim.posthuma@esperanto.se*

## La libro de d-ro Puramo pri Sa-am

Karaj samideanoj!
Koran dankon al Vi pro la bulteno INA (oktobro 2003). Multaj miaj konatuloj lernis la ĉinan akupunkturon, sed d-ro Puramo Chong estas mirinde pli bona. Lia metodo tre interesas min. Eble iam mi sukcesos aĉeti por mi lian libron pri Sa-am. Dio benu kaj helpu al ni ĉiuj!
Kun koraj salutoj el Estonio

*E. Lobjakas*, P/K-52,
203170 HAAPSALU, Estonio

## Kunlaboro de UMEA kaj INA

Estimata s-ino Rosa!
Via sendaĵo bonorde alvenis. Dankegon. Kun intereso mi tralegis la revuon de via asocio. Precipe ĝojigis min la fakto, ke niaj du asocioj - INA kaj UMEA - en estonto aktive kunlaboros kaj organizos komunajn konferencojn. Kiel promesinte mi sendas al vi la Konferencan libron de la pasinta 14-a IMEK en Rumanio.

Dezirante ĉion bonan, ankoraŭ foje mi dankas vian afablecon, elkore salutas vin, via
*Istvan Budahazy*
bd. Dacia 99 bl. D2 ap.24
3700 Oradea, Rumanio
*bhazy@rdslink.ro*

## Nova membro el Rumanio

Estimataj!
Varman dankon por via sendaĵo: INA,

Oktobro 2003. En via revueto mi trovis interesajn legaĵojn. Mi informas Vin, ke mi estas I. M. de UEA, L.D. kaj FD por medicino en Rumanio ekde 1970j., dank' al fondaĵo Zanuto, ĉar mi loĝas en nepagipova lando. Krome tio mi estas ankaŭ Landa Delegito de UMEA en Rumanio.

Rilate al nia poresperantista agado ni informas Vin, ke mi estas kunlaboranto al nia Medicina Internacia Revuo kaj al nia esperantlingva revueto en Rumanio: BAZARO. Mi publikas regule komunikaĵojn pri medicinaj temoj. Nelonge petis min kunlabori ankaŭ la Scienca Revuo. Pro mia agado mi gajnis en 1984 la Schinoda-Premion.

Mi volonte kunlaborus ankaŭ kun via INA kaj mi membriĝus, sed mi ne povas pagi la kotizon. Tamen mi estos dankema al Vi, se sendus vian revueton, ĉar interesas min la naturkuracado, kiun mi aplikis en mia medicina praktiko. Mi deziras al Vi sukcesan agadon, agrablan Kristnaskon kaj feliĉan 2004 novan jaron! Elkore salutas Vin

*D-ro Gábor Lázár*
str. Stefan cel Mare 26/a
4055 Covasna, Rumanio

## Fakaj Esperanto-gazetoj

Karaj, mi dankas pro la INA-gazeto de oktobro 2003 kun la demando ĉu ĝi aperadas regule? Kiom da kostus la abono por tuta jaro?

Mi ĉiam ĝojas akiri de iu fako (naturkuracado) ekzempleron por montri al la ekstera mondo, kiel funkcias kaj taŭgas Esperanto ankaŭ por diversaj fakoj, sciencoj ktp.

Ankaŭ dum prezentadoj tre gravas havi freŝdatajn gazetojn por konvinki homojn.

Pro tio mi korege dankas al vi pro via informativa kaj belaspekta gazeto. Kore via amiko el Elb-sablo-ŝton-montaro

## Viaj kontribuoj dezirataj

Por nia INA-revueto ni petas viajn kontribuojn. Nia deziro estas, ke la revueto kresku! Tio ne eblas sen via helpo.

Se vi estas paciento, skribu pri viaj spertoj, se vi estas kuracisto, skribu, kiel vi aplikas naturkuracadon.

N-ro 2 aperos en aprilo, **la 52-paĝa kongresa n-ro 3** je UK en Pekino.

INA estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio

Eldonejo: MZ-Verlag Ltd.
Schoolbrink 12, D-27383 Scheeßel, Germanio. Rete: info@mz-verlag.de
www.mz-verlag.de

Ĉefredaktoro: Harald Schicke

Adreso de INA:
D-ro Puramo Chong
Kwangmyong-2dong 50-5
Kwangmyong-shi
Kyonggi-do - 423-012, Koreio

**Adreso por korespondado**:
Rosa Ebel, Schmiedestr. 99,
47809 Krefeld, Germanio

*Norbert Karbe*, Dr.-Otto-Nuschke-Str. 12
01796 Pirna, Germanio

## Paroligaj seminaroj en Ĉeĥio

Bonan tagon, estimataj. Koran dankon por Via broŝureto!

Nia familia ... pensiono, kie okazadas dufoje jare paroligaj seminarioj de Esperanto jam tradiciaj. La estonta 18-a okazos 14-21.04.04. Prezo estas tre favora: kompleta prizorgo (manĝo, lito) 10 Euroj tage. 75 km nordoriente de Prago. Certe estus konvena via prelego pri naturmedicino. Samideane

*D-ro Josef Hradil*, Druzstevni 1161
295 01 Mnichovo Hradiste, Ĉeĥio